

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2024-04-15 ĝis 2024-07-15.

*Ŝlosilpunktoj: ILEI-kongreso 2024; ILEI-kongreso 2025 kaj ties Simpozia temo; kontribuo de ILEI al la UK de Aruŝa; Seminario por instruista trejnado kadre de internacia kongreso en Serbio; evoluoj de “Premio La Torre”; “Instruisto de la Jaro”; Lernolibro de Esperanto en la svahila, Simpoziaj Aktoj 2022-3 kaj aliaj eldonaj projektoj.*

## **INSTANCOJ**

### **La Estraro**

Pludaŭras preparado de la elekto de la venonta Estraro de ILEI dum la hibrida Komitatkunsido de la 22-a de julio 2024, dum la 57-a Kongreso de ILEI en Maceio. Kandidatiĝoj estos malfermaj ĝis la lasta momento kaj devas alveni al la Elekta Komisiono (Aurora Bute, Zsófia Kóródy, Aristophio de Andrade). Programistino Cristina Bollini estas studanta la plej efikan sistemon por garantii la glatan divolvon de la balotado laŭ la regularo.

### **La Komitato**

La Komitatkunsido okazos hibride la 22-an de julio inter 12:00-15:30 UTC. Pro la graveco de la okazo, estus bone, ke ĉiuj komitatanoj klopodu partopreni. Sed ili rajtas skribe peti esti reprezentataj de alia komitatano por la kunsido kaj la baloto, se ili ne povos persone partopreni rete aŭ ĉeeste. Je la komenco de la kunsido ni nombros la voĉojn.

### **Sekcioj**

En la venonta Komitatkunsido la Estraro prezentos por aprobo la Kuban Sekcion, la 40-an sekcion de ILEI. La Estraro petas sekciestrojn, kiuj ankoraŭ ne faris tion, sendi al Estrarano pri sekcioj Marija Jerković siajn raportojn pri la sekcia agado en 2023!

## **EVENTOJ**

### **ILEI-Kongreso 2024**

Dank’ al la granda laboro de la LKK kaj de la estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni, la kongreso en Brazilo havas tre buntan programon. La plejmulto de la ĉeestaj partoprenantoj estas brazilanoj, sed estos hibrida kongreso. ILEI ofertis stipendiojn por subteni ĉeestan partoprenon, dank’ al la enspezoj de la profitodona Kongreso de Linjano Orsabla. Aliĝilo troveblas ĉe: [2024.kongreso.org](http://2024.kongreso.org). Ĝis nun aliĝis 66 homoj. Dum la programo, Ursula Grattapaglia ĉeeste parolos mardon pri sia longa kaj admirinda agado en Brazilo, memorigante sian edzon Giuseppe. Vicprezidanto Alessandra Madella instruos Seminarion pri manĝetiketo kiel interkultura komunikado kiel parto de la programo de “Virina Agado”, ĉar aferoj rilataj al ĉiutaga vivo estas ofte konsiderataj “virinecaj”, sed ĝuste pro tio ili estas loko de granda forto por virinoj. Kadre de ĝi, prelegos pri manĝetiketo en Ĉinio Arko (GONG Xiaofeng), kiu estas interalie la estrino de la tute nova komisiono pri “Virina Agado” de UEA. Estos parto de la programo de “Virina Agado” ankaŭ la tri prelegoj de la plej juna komitatano de la komisiono, Ariadna Garcia Gutierrez el Kubo, kiu espereble sukcesos partopreni ĉeeste.

### **ILEI-Simpozio 2024**

Pretas la riĉa programo de la simpozio, organizata de estrarano Fernando Pita laŭ la temo “Lingvoj de instruado kaj justa edukado”. Aparte ĝojinda afero estas, ke prelegos ankaŭ brazilaj fakuloj kaj aktivuloj, kiuj ne prelegis en antaŭaj simpozioj de ILEI. Ankaŭ tio montras, ke nia kongreso kontribuos al la movado en la regiono. Dum la Simpozio estos prezentata la libro de la Simpoziaj Aktoj de ILEI 2022-23 (vidu sube).

## **ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2025**

La Estraro de ILEI akceptis la inviton el Serbio, ke la 58-a ILEI kongreso okazu en Beogrado, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025, tuj post la UK en Brno. La ĉeftemo de la kongreso estos “Artefarita Intelektio kaj Lingvolernado”.

Laŭtradicie, okazos universitatnivela simpozio pri la kongresa temo en la kongresaj ĵaŭdo kaj vendredo (31.07-01.08.2025) malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj esploristoj pri la temo. La celo estas dialogigi la esperantistan kaj neesperantistan flankojn, kaj konigi Esperanton en scienculaj medioj ekster Esperantujo. Estrarano Radojica Petroviĉ sendis prian alvokon al kunlaboro al la listo de universitatoj prizorgata de Renato Corsetti.

## **Kongreso 2026**

Ĉe la paĝaro de ILEI troveblas detala alvoko por kandidatiĝo al la kongreso 2026: [https://www.ilei.info/novajxoj/alvoko\\_por\\_2025-2026.php](https://www.ilei.info/novajxoj/alvoko_por_2025-2026.php)

Konforme al la Kongresa regularo de ILEI ([https://www.ilei.info/dok/Kongresa\\_regularo.pdf](https://www.ilei.info/dok/Kongresa_regularo.pdf)), la Estraro de ILEI invitas landajn sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizaĵojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por invitanto de la 59-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2026.

## **Partopreno de ILEI dum la UK de Tanzanio**

Dum la malferma ceremonio, nome de la Ligo saluto ĉeeste de la podio Mireille Grosjean, kies salutvortoj aperos poste en IPR. Prizorgos ĉeeste pri la Movada Foiro la sekciestro de la Tanzania Sekcio de ILEI, Mulele Mbassa, kaj Marija Belošević, kiu ankaŭ organizis kiel kutime la tradicion “Tagon de Lernado” dum la UK. Prezentos ILEI dum du horoj en speciala programero Aurora Bute kaj la estrino de la Sekcio de Madagaskaro, Miora Raveloharison, kun la helpo de Joel Muhire, la estro de la Konga Sekcio. ILEI ankaŭ organizis tri ĉeestajn lingvajn kursojn: Miora gvidos ok-horan trejnseminaron por instruistoj, laŭ modelo de tiu, kiun ŝi jam sukcese instruis en januaro en Antananarivo, Madagaskaro. Helpos ŝin Mireille Grosjean. Joel Muhire, kun la helpo de John Magessa, instruos 5-horan kurson por komencantoj, surbaze de lia noveldonita lernolibro de Esperanto en la svahila (vidu sube). Aurora Bute instruos konversacian kurson por progresintoj. ILEI ankaŭ subtenas per 200 eŭroj la Kongreson de Afrikaj Virinoj organizatan de Miora kaj de la komitatanino de la Konga Sekcio Alexandrine Omba en Tanzanio ĝuste antaŭ la UK. La ĉef-subtenantoj estas UEA kaj ESF. Alessandra Madella prelegos videe pri la ĉina samideana verkisto Cicio Mar kaj liaj rilatoj kun anglaj verkistoj en la jaroj '30 kaj '40 por la Esperantologia Konferenco. Prelegos tie aliaj ILEI-anoj kiel Mirejo, Renato Corsetti, Kristin Tytgat ktp.

## **KAPABLIGO**

### **Seminario por instruista trejnado en Serbio**

ILEI invitas al partopreno en Seminario de Serba Esperanto-Ligo (SEL) por instruista trejnado kaj aktivula lertigo okazonta inter la 17a kaj 24a de aŭgusto 2024 en Beogrado, enkadre de Erasmus-projekto de SEL. Ĝi estas parto de ampleksa evento organizata kunlabore kun LIBE kaj sub respondeco de Radojica Petroviĉ kaj Aranka Laslo. Ĝi enhavos, interalie, Tagojn de ILEI (regionan renkontiĝon de instruistoj kaj ILEI-anoj de balkanaj kaj danubaj landoj). La sukceso de la tuta evento certe faciligos la pretigadon de la ILEI-kongreso 2025, dank’ al la konstruado de fortaj ligoj kun gravaj lokaj instancoj, kiel ministerioj kaj faka tradukista asocio. Pliaj informoj pri la seminario legeblas ĉe <https://eventaservo.org/>. La 5-an de majo 2024 Radojica prezentis la sidejon dum la Irana Kongreso de Esperanto. La programero spekteblas en la jutuba kanalo UEA viva.

## **UNIVERSITATA AGADO**

## "Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj"

La Kunpens(ig)adoj okazas regule kaj registraĵoj de ĉiuj sesioj spekteblas ĉe la jutuba kanalo de UEA: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>.

En majo, Arko parolis pri la instruado en ĉinaj universitatoj kaj Ilona Koutny pri la kursoj en Poznano, kiuj estas unika eksperimento.

En junio, Ahmad Reza Mamduhi raportis pri la kurso pri interlingvistiko, kiun li estas instruanta por Universitato Espoir de Kongo, laŭ la lernolibro de Vera Barandovská kaj kun aldonaj materialoj. Ĉiuj registraĵoj spekteblas en la jutuba kanalo "Esperanto + Edukado ILEI".

En la julia Kunpensigado, Radojica Petroviĉ varme alvokis fakulojn partopreni en la Simpozio de la ILEI-kongreso 2025 en Beogrado kaj en konferenco de faka tradukista asocio, kiu helpos organizi ĝin.

## INSTRUADO DE ESPERANTO

Kiel jam anoncote, ILEI subtenis la kurson por knabinoj fare de la estro de la Benina Sekcio, Latifou Gbadamassi.

Ĝojiga sciigo estas, ke ĉiuj lernejoj de Aruŝa en Tanzanio ricevis la oficialan permeson fare de la aŭtoritatoj enkonduki Esperanton kiel lernobjekton por pretigi lernantojn por la atendata evento de la UK. *Gratulojn al niaj samideanoj de Tanzanio por ilia efika agado!*

La junia numero de la revuo *Esperanto* de UEA, zorge de Arko, publikigis raporton pri la ĉefaj lokoj de nuntempa instruado de Esperanto en ĉinaj universitatoj: de la Universitato de Zaozhuang al Lingva kaj Kultura Universitato de Pekino al Zhezhiang-a Komunika Universitato. En Zaozhuang, krom la fakaj lecionoj, estis ankaŭ nefaka kurso de Esperanto por studentoj de sciencaj fakoj kaj ĉiusemajna kurseto por volontulaj studentoj de la angla fako. Gvidis la unuajn Alessandra Madella kaj Choi Manwon, la lastajn Alessandra. Interesa agado en Zaozhuang vidis ankaŭ la instruadon de 4 fremdaj lingvoj (Esperanto, la angla, la korea kaj la itala) al 14 infanoj dum 6-taga somera tendado organizita de Sun Mingxiao kaj kun la partopreno de John Huang el Kanado.

## Porafrika agado

Sara Spanò afable akceptis porti 20 vortarojn Svahila-Esperanto de Jan Knappert al la UK por transdoni ilin nome de ILEI al Mulele Mbassa.

ILEI financis la eldonadon de la lernolibro de Esperanto en la svahila de Joel Muire, inspirita de lia sperto instrui ĉe Universitato Espoir de Kongo (kie li heredis la kurson de Nino Vessella) kaj korektita de John Magessa. ILEI pagis 1 025 eŭrojn por printi 1 000 kolorajn librojn ĉirkaŭ 100-paĝajn en formato B-5. La libroj aĉeteblos dum la UK de Tanzanio kontraŭ 3 eŭroj por afrikanoj kaj 5 eŭroj por la aliaj. La Estraro de ILEI planas uzi la enspezitan monon por financi plian eldonon de la libro, kun fotoj, kiuj helpas interkulturan komunikadon. Por tiu ĉi eldono, fotoj faritaj de Joel Muhire kaj uzeblaj kune kun la lernolibro elŝuteblos el la paĝo pri eldonaj agadoj de la retejo de ILEI ([www.ilei.info](http://www.ilei.info)). La libro estas eldonita en Tanzanio per la ISBN-kodoj de ILEI, kiun la Ligo uzis interalie por eldoni la lernolibron de la svahila en Esperanto de Nino Vessella.

Kroata Esperanto-Ligo ankaŭ anoncis, ke 31 ekzempleroj de ĝia lernolibro en la svahila preneblas senpage de ĝia budo dum la Movada Foiro en Aruŝa. Poste la lernolibro aĉeteblos kontraŭ 10 eŭroj.

Françoise Noireau (Franzoaso) daŭre gvidas kurson por grupo de afrikaj komencantoj en vacapo.

## EToSo

En la jutuba kanalo de ILEI daŭre aperis registraĵoj de diverslingvaj A-nivelaj kursoj de Esperanto, i.a. en la araba kaj kurda. Ankaŭ registraĵoj de unulingvaj B- kaj C-nivelaj kursoj de Esperanto alŝutiĝas tien, kune kun instruado per Esperanto ekzemple pri la svahila lingvo (ĝis nun spekteblas 26 registraĵoj: [https://www.youtube.com/watch?v=m44pHE-ncAQ&list=PLufbtAhDHic3iBqNugM\\_ZVBrvEPKIKyph](https://www.youtube.com/watch?v=m44pHE-ncAQ&list=PLufbtAhDHic3iBqNugM_ZVBrvEPKIKyph)), kaj pri interligvistiko (ĝis nun spekteblas

23 registraĵoj: <https://www.youtube.com/watch?v=q951ml0UINI&list=PLufbtAhDHic0-ZKTJmMkQTpzOBHGLWsx0>).

### **ILEI-forumoj por lernejaj instruistoj**

Daŭras forumoj por instruistoj “Lerneja Esperanto-agado”, laŭ la iniciato de komitatano Didier Janot. Ili celas interalie kompreni kiel ILEI povas pli konkrete helpi al instruistoj kaj tiel kreskigi la nombron de instruistoj efektive laborantaj en lernejoj inter la membroj de la Ligo. Regule sekvas la agadojn la Sekretario de ILEI, Elena Nadikova. Nun 9 registraĵoj de tiaj forumoj spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLufbtAhDHic0vRZ2A9mwVBPSQm85BC6s0>

### **PROJEKTOJ**

#### **Premio La Torre**

Ekis la nova eldono de la konkurso por la Premio omaĝe al Profesoro Mauro La Torre (1946 – 2010). Naŭ kandidatoj el diversaj landoj kaj kontinentoj anoncis sian kandidatigon (2024/04/15) kaj ok personoj sendis bonorde resumon kaj strukturon de sep esplorraportoj (2024/06/15). La venonta limdato estos 2024/09/30, por skiza mezperioda esplorraporto. La Estraro de ILEI starigis internacian juĝkomisionon (aprobitan de Familio La Torre). La membroj estas Ahmad Reza Mamduhi (prezidanto, Mez-Azio), Renato Corsetti (Eŭropo), Bak Giwan (Orienta Azio), Dennis Keefe (Nord-Ameriko), Fernando Pita (Latin-Ameriko), A. Giridhar Rao (Suda Azio), Trevor Steele (Aŭstralio), John Magessa (Afriko) kaj Alessandra Madella (Eŭropo).

La konkurso La Torre okazis jam tri fojojn, en 2015, 2018 kaj 2022. Ĉi jaron familio La Torre esprimis ĝojon pro la nombro kaj nivelo de la alvenintaj proponoj.

#### **“Instruisto de la Jaro”**

La Estraro decidis lanĉi konkurson “Instruisto de la Jaro” laŭ la sekvaj kriterioj proponitaj de estrarano Marija Jerković:

1. Li/ŝi ofte aŭ regule gvidas kursojn de Esperanto ĉeeste, koresponde, rete aŭ alimaniere.
  2. Li/ŝi uzas diversajn instrumentojn kaj helpilojn, prelegojn, ludojn, kantojn, teatraĵojn, per kiuj la gelernantoj akiras altan nivelon de la lingvoscio kaj de ĝia praktika uzebleco.
  3. Li/ŝi partoprenigas la gelernantojn en la instruprocezon kiel aktivajn kunlaborantojn.
  4. Li/ŝi instruas ne nur gramatikon kaj vortprovizon, sed informas gelernantojn ankaŭ pri aliaj aspektoj de la Lingvo Internacia (ideo pri egaleco, paco, tutmondiĝo), inkluzigavante ankaŭ sciojn pri ĝiaj historio, literaturo ktp.
  5. Li/ŝi kunlaboras kun aliaj instruistoj kaj instruistaj organizoj en la lando kaj eksterlande.
  6. Li/ŝi kreas novajn instrumaterialojn, modernigas la instruadon, verkas lernolibrojn kaj instru-helpilojn.
  7. Li/ŝi informas pri okazintaj kursoj kaj iliaj rezultoj.
  8. Kursoj kaj ekzamenrezultoj de liaj/ŝiaj gelernantoj konfirmas la kvaliton de lia/ŝia instruado.
  9. Liaj/ŝiaj gelernantoj restas aktivaj esperantistoj aŭ konservas pozitivajn memorojn pri la instruado.
- La premio estos unu-jara membriĝo al ILEI kun bita versio de IPR, unu libro papere eldonita de ILEI kaj atestilo.

Ankaŭ la Estraro de TEJO multe ŝatas la ideon kaj proponis aldoni premion por la “Juna Instruisto de la Jaro” ĝis la aĝo de 35. Por tiu ĉi lasta, kiu sekvos la indikojn de ILEI en la elektado surbaze de la kriterioj menciitaj en la malferma alvoko, TEJO proponas similajn premiojn (ekzemple: bita versio de

la revuo *Kontakto*, t-ĉemizo kun ŝildo de TEJO-logoo kaj senpaga membriĝo en TEJO por unu jaro kaj atestilo).

**Ni varme invitas mem-kandidatiĝojn por ambaŭ premioj al [ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com)  
La premiado okazos la 31-an de decembro, daton de la 75-jariĝo de ILEI.**

## **ELDONADO**

Omaĝe al la 75-jariĝo de ILEI, la eldona agado de la Ligo estos precipe forta ĉi jaron. Krom la jam dirita lernolibro de Joel Muhire, preskaŭ pretas la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-3*, redaktita de Alessandra Madella kaj eldonata de Edistudio en bita kaj papera versioj. Ĝi estos preta por la Itala Kongreso en Montecatini, fine de aŭgusto 2024. La libro enhavas interesajn eseojn, speciale (re)verkitajn kun la plej ĝisdatigitaj datumoj por eldonado. Pludaŭras la laboro de Fernando Pita por finpretigi la unuan volumon de la antologio de IPR ĝis decembro 2024, ankaŭ por bita kaj papera eldonoj kun brazila eldonejo. Aldone, ILEI kunlaboros kun Itala Instituto de Esperanto por eldoni kun Edistudio la anglan tradukon de la libro de Alessandra Madella, *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. Laŭplane, la traduko estos preta en novembro, kiam ĝi ankaŭ utilos por persvadi grandan korean eldonejon proprakoste realigi la tradukon de la libro al la korea faritan de la profesi-nivela tradukistino Chang Sumi.

## **IPR kaj JA**

*Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko* daŭre kaj regule aperas, kun interesaj kaj enhavo-riĉaj numeroj.

## **KUNLABORO KUN ENMOVADAJ INSTITUCIOJ**

### **Kun UEA**

#### **Internacia Esperanto-kongreso**

Pro la komuna fokuso pri Interkultura Kompetento, UEA subtenos la Internacian Esperanto-Kongreson, kiu okazos en Beogrado ekde la 17-a ĝis la 24-a de aŭgusto 2024. Bonvolu deklari vian intencon partopreni per mesaĝo al: <[nedeljkalozejic@gmail.com](mailto:nedeljkalozejic@gmail.com)> aŭ <[zarkovicjovan@gmail.com](mailto:zarkovicjovan@gmail.com)>.

#### **“Virina Agado”**

UEA nove lanĉis komisionon pri “Virina Agado” kaj pluraj ILEI-anoj estas inter la fondaj membroj. La nunaj komitatoj estas Arko, Małgosia Komarnicka, Alessandra Madella, Miora Raveloharison, Ariadna Garcia Gutierrez dum la nunaj konsilantoj estas Anna Löwenstein, Mireille Grosjean, Luiza Carol, Maritza Gutiérrez kaj Alexandrine Omba. La komisiono precipe subtenas egalecon inter la seksoj kaj virinajn rajtojn. Jam vigla agado ekos ĉi-somere, dum la ILEI-kongreso (zorge de Arko, Alessandra kaj Ariadna), antaŭ la UK (zorge de Miora kaj Alexandrine) kaj dum la Itala Kongreso (zorge de Małgosia kun la helpo de Alessandra). Alessandra lanĉis la rondirantan rakonton “Pri viroj kaj kunikloj”, al kiuj virinoj rajtas sinsekve aldoni 5 frazojn. Ĝis nun partoprenis 12 virinoj el 5 landoj. Kunverkemaj virinoj povas kontakti Alessandra. La celo estas internacie kunlaborigi verkemulinojn por ekzerci imagokapablon kaj samtempe reklami tiamaniere la ekziston de “Virina Agado”. La longiĝanta teksto estos regule montrata en la listo de “Virina Agado”, en kiu ĉiuj virinoj estas bonvenaj.

### **Kun TEJO**

Vidu supre pri “Juna Instruisto de la Jaro”.

### **Kun Irana Esperanto-Asocio (IrEA)**

Pluraj estraranoj kaj ILEI-anoj prelegis dum la 11-a Irana Kongreso, la 4-an kaj 5-an de majo 2024. La prelegoj spekteblas en la jutuba kanalo de UEA:

<https://www.youtube.com/watch?v=ne75ZuoIscQ&t=85s> kaj  
<https://www.youtube.com/watch?v=zQESK92rS5Q&t=5455s>.

### **Kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI)**

En majo aperis en la Esperanta retejo de Ĉina Komunikila Grupo artikolo de Alessandra Madella “Seminario pri Esperanto kaj Grandkanala Kulturo en Yangzhou” pri interesa evento organizata de Longarko (Zhang Changsheng) kun la partopreno de la Esperanta Lego-grupo de Arko.

### **KUNLABORO KUN EKSTERMOVADAJ INSTITUCIOJ**

#### **Kun FIPLV**

La numero de aprilo 2024 de la bulteno de FIPLV enhavas la 4-paĝan artikolon de Alessandra Madella “The Tenth Anniversary of the Esperanto Museum at Zaozhuang University” (La Deka Datreveno de la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a Universitato) pri la vizito de Duncan Charters al la ĉina universitato kaj la solena festo por la Esperanto-Muzeo. ILEI jam sendis al FIPLV sian jarraporton por 2023.

#### **Gratulojn**

Zsófia Kóródy ricevis pro pli ol dudekjara multflanka elstara laborado por resp. per la neŭtrala paclingvo Esperanto en Herzberg am Harz -- la Esperanto-urbo -- la renomman premion de la Federacia Prezidanto s-ro Steinmeier. Tio estas grava paŝo antaŭen por la socia, politika kaj administracia agnosko de Esperanto. Elkorajn gratulojn al Zsófia!

#### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Vicprezidanto de ILEI: Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2024-07-15